

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 2 (17), Februaro 2006

**Adreso (provizora):**  
**Esperanto Societo de Ŝikago**  
**p/a Viktor' Pajuk**  
**8228 O'Connor Dr., # 2F**  
**River Grove, IL 60171**  
**(773) 344-2276**  
**www.esperanto-chicago.org/**

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak  
Kasisto – Karlo Gunn

## Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;  
Familio \$30; Regula \$20;  
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.

**Dues** are needed for the routine expenses of our Society.

Check should be payable to:

**The Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

## Kunvenoj:

Membroj de la Ŝikaga Esperanto Societo kunsidas la kvaran merkredon de ĉiu monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Bonvenon!

*Kara leganto*, jen denove mi prenas mian plumon kaj... ekfrapas la klavaron de mia redakcia komputilo. Hodiaŭ vi ne legos rubrikon *Laste Okazis*, ĉar pro foresto de nia ĉefpreleganto ni havis okazon iel priparoli la situacion en la monda kaj la loka E-movadoj. Antaŭ nelonge estis ricevita interesa statistiko pri kredo je “fina venko”, ĝi estis surtabligita dum la kunsido, sed evidentiĝis, ke ne ĉiuj niaj societanoj sciis, pri kio temas. Pro tio mi volas mallonge klarigi kelkajn gravajn punktojn el la historio de la monda E-movado (informo prenita el la E-Vikipedio). La **Fina Venko** (pracelo) estas la ideo, ke iam ĉiuj parolos E-on kiel duan lingvon. Oni nomas tiun idearon **Finvenkismo**.

Kontraŭe, **Raŭmismo** (laŭ nomo de suomia urbo Raŭmo) konsideras la Finan Venkon mito. Raŭmistoj disvastigas E-on pro ĝiaj valoroj, kiuj realiĝas en la esperanta komunumo, perceptata kiel mem elektita diaspora lingva grupo.

Por la finvenkistoj E-o estas ĉefe komunikilo, sed por raŭmistoj – ankaŭ identigilo kaj arta perilo.

Kaj nun revenu al la komenco. En novembro 2005 Andreas Kuenzli (Svislando) faris privatan enketon, stariginte simplan demandon: “Ĉu vi kredas je la ‘fina venko’ de E-o?” La mesaĝo estis sendita al 750 UEA-delegitoj (576 viroj kaj 174 inoj). El respondintoj 58.3 % kredas je la ‘fina venko’ kaj 27.8 % neis la demandon. Organizinto de la enketo ne volis fari konkludojn kaj komentojn. Kaj kion opinias vi?

## UK en Florenco



Sendube, la plej grava E-evento de la kuranta jaro estas UK en itala urbo Florenco, kiu okazos 29.07-05.08. Ĝis la 11-a de Feb. la 91-a UK nombris jam 1384 registritajn aliĝintojn el 53 landoj. Se la aliĝado en la dua kaj tria kotizperiodoj sekvos saman ritmon kiel en antaŭaj jaroj, en Florenco kunvenos la tria sinsekva UK, post Pekino kaj Vilno,

kun pli ol 2000 aliĝintoj.

Ekde la komenco de la aliĝado la kongreslando Italio kaj la najbara Francio rivalas pri la unua loko de la statistiko. Ĉe la pinto staras nun Francio kun 218 aliĝoj, dum Italio reprezentiga per 186 (Usono – 28, Ŝikago – 0).

Ne cerbumante longe kion proponi al vi el la itala literaturo, mi elektis soneton de Dante Alighieri *Mia Estrino* en majstra traduko de la ‘patro de E-poezio’ A. Grabowski. Do, ĝuu ankaŭ vi:

Aperas jen, modeste kaj ĝentile,  
Estrino mia kun la gest' saluta;

### UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –

Home of a comprehensive FAQ list  
[http://www.esperanto.net/info/index\\_en.html](http://www.esperanto.net/info/index_en.html)

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;  
toll free: 1-800-ESPERANTO  
(1-800-377-3726)

<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association

<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet

<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course  
<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation

<http://esperantic.org>

Pasporta Servo

<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in

RealAudio format

<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:

<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

## Sekvantaj kunsidoj:

**22an de Februaro** – nia vic-prezidanto **d-ro Puramo Chong** raportos pri la laboro de INA en Ŝanhajo

**22an de Marto** – XX datrevenon de Ĉornobila katastrofo en Ukrainio

**26an de Aprilo** – vizito de fama rusa E-poeto k kantisto Mikaelo Bruna Ŝtono

La *SALUTON!*-redakcio preskaŭ samtempe ricevis vokojn de du niaj membroj kun peto ŝanĝi la tagon de nia kunsido de merkredo – al mardo. Kion VI pensas pri tio? Bv informi nin. Koran dankon.

*Araneo*

Tremante ĉiu lango iĝas muta,

En bril' okuloj klinas sin humile.

Sentante laŭdojn, iras ŝi trankvile,

De l' honesteco investite tuta,

Sur teron kvazaŭ ĉielalto kruta

Fluigis mirindaĵon perflugile.

Kaj ŝi afable donas por admiroj

Dolĉecon tian per okul' al koro,

Ke tiu nur ĝin konas, kiu provas;

De ŝiaj lipoj sin karese movas

Spireto ama, plena de favoro,

Ke diras al anim': "Al mi, sopiroj!"

## Utila informo

– Redakcio memorigas, ke la lasta plena semajno de februaro estas Semajno de Internacia Amikeco (SIA). Memkompreneble, ĝi estas tre grava ankaŭ por ŝikago-landaj esperantistoj. Sekve, subteni ĝin estas nia devo. Estraro alvokas ĉiujn anojn ne preterpasi tiun eventon.

– Karpo Jakobo invitas vin partopreni 15-29 de julio Renkontiĝon de E-familioj, kiu okazos en ĉeĥa urbeto *Pilsky Mlyn*: <http://ref.esperanto.cz/>

□ Ukrainaj esperantistoj invitas vin viziti la plej prestiĝan kuraĉlokon de Ukrainio, krimean urbon – Jalton. La 29.04-09.05.2006 tie okazos la tradicia lingva E-festivalo "Aroma Jalto-2006". Belega ekzotika naturo, altaj montoj, senlima Nigra maro, florantaj kreskaĵoj, historiaj kaj naturaj vidindaĵoj inSPIROS vian animon kaj iĝos neforgesebla evento de la jaro. Krimeo ĉiam allogis multajn homojn, kiuj strebas alten. Famaj verkistoj, poetoj, pentristoj, e-istoj vizitis tiun ĉarman bordon de la duoninsulo por krei siajn ĉefverkojn. Kontakto: [volodimir\\_h@yahoo.com](mailto:volodimir_h@yahoo.com)



! Do You want to practice Your Esperanto by phone? **Mr. Byron Eiguren** will help You to achieve fluency in IL conversation. Call him: **(847) 446-6764**. He's a linguist and speaks several languages, including English and Spanish.

## Dankoj

La Societon lasis ĝia eksa sekretario Ernesto Buenemann – li forveturis hejmen, al Germanio. Sed anime li restis kun ni kaj adiaŭante li donacis al nia biblioteko diskigitan filmon *Inkubo*. Ernesto, dankon kaj sukcesojn al vi en la gepatra lando!

Dankon al sinjoroj Roĝero Blaine, Gregoro Dolgin kaj Viktoro Pajuk, kiuj jam katalogis librojn el la kestoj, disdonitaj dum la lasta Zamenhofa bankedo.

Estu sanaj kaj feliĉaj en ĉi maltrankvila mondo!



araneoesp @ yahoo.co.uk